

# La SAGO

La Sat-Amikara GazetO

*Espéranto :  
vers une culture sociale sans frontières.*



FEK AL LA  
MALJUSTECO  
NI ESTU LA SOLVO,  
NE LA PROBLEMO  
INDIGNU !

(Messages en ESPERANTO)

**Mi indignas!**  
Indignu vi, tamen  
respektu la gramatikon !

Ĉu vere,  
vi taksas  
tion  
ne korekta ?



**Oni indignas ĉie  
precipe ĉe paĝo 6!**



*L'esperanto au bac!*



## Ça colle et ça signe!...

Au 1er juillet, nous avons recueilli 6232 signataires au total (internet et signatures papier centralisées)

<http://esperanto-au-bac.fr/spip.php?rubrique2>

**Feuille de signature:**

<http://esperanto-au-bac.fr/IMG/pdf/feuillesignatureelus.pdf>

**Liste des signataires :**

<http://esperanto-au-bac.fr/spip.php?page=signataires>



## Esperanto

Filmo de Dominiko Gaŭtiero

(Dominique Gauthier)

## Sukcesaj projekciadoj de la provoversio

La unua provoversio de la filmo estis antaŭpremiere prezentita dum la Internacia Renkontiĝo Esperantista ĉe Mediteraneo en Seto, dum la paska semajnofino.

Dua projekciado okazis en Fontano (Fontaine), apud Grenoblo, vendredon la 13an de majo, enkonduke al la Rodanalpa Esperanto-Kongreso.

Tria projekciado, multe pli diskreta, sed tamen anoncita en loka gazeto, okazis en sudfrancia vilaĝeto, Vergonjano (Vergoignan), en alternativa ekspoziciejo, la 22an de majo.

Kvara projekciado sukcese okazis en Plelin-Trigavuo (Pleslin-Trigavou), Bretonio.

Nun la filmo estas finmuntata. La definitiva versio estos premiere projekciita en Eo dum Kinofestivalo en Brazilo julimeze.

Iaŭ Vinko Markovo

<http://esperantofilmo.com/spip.php?article18>



# Kongreso 2011 en Seto: Raporteto pri la kongresaj laborkunsidoj

Jen konciza versio de la kongresa raporto. Ĝi celas diskonigi la ĉefajn okazaĵojn k agadproponojn por la estonteco.

Atentigo: ĉi teksto kompletigas la agadraporton aperintan en LS73 (marto 2011) k do vole ne ripetas informojn, kiuj jam aperis tie.

## Unua laborkunsido

Prezidis Ĵanino Dumuleno (Dumoulin)  
kun Ĵak' LePüill'

## Agadraporto 2010

**Pri membraro:** rilatado kun eskterfranciaj homoj por tutmondigi en Franclingvio la agadkampon de la asocio survojas. Tiurilate notindas, ke post Ĵan-Ivo Santero (Santerre), kiu multajn jarojn zorgis la helpservon al forlandanoj (ĉefe Afrikanoj) - estu li dankata! -, transprenis la taskon skipeto en Dinano (bonvenon al Klaro Gverino [Guérin], Deniz' [Denise] Priet-LeFol' k Filipino Strido [Stride]!) Priatentinda falo de la membronombro, sed dum unua sesmonato de 2011 jam venis pli da novuloj ol dum tuta 2010, do kuraĝiga rezulto jam.

**Pri komitato:** esprimiĝis deziro pri ne lista, sed unuopa sekreta voĉdonado referendumo, sed ne estis farita decido pri tio. La listo aprobata por 2011 konsistas el rekandidataj Fil' Giĉeto (Phil Guichet), Maksimiliano Gverino (Maximilien Guérin), Veroniko Ĵirar' (Véronique Girard), Gi' Kavaljero (Guy Cavalier), Vito Markovo (Vito Markov), Gi' Marteno (Guy Martin), Dominiko Simeono (Dominique Siméone) k aldone Serĝo Sir' (Serge Sire). Postkongrese Serĝo preferis rezigni sian kandidatecon.

**Pri lokaj perantoj:** la reto de perantoj bone ekfunkcias k kvante duobliĝis en

unu jaro (dankon al la bonvolemluloj)! Pluraj novaj perantoj estis proponitaj dum la kongreso mem. Nun mankas en Francio ankoraŭ por: Alzaco, Ĉampanjo-Ardeno, Franĉkonteoj, Korsiko, Supra k Malsupra Normandioj, Piktavi-Ĉarentio, Provalpazuro. Kontaktu nin! (sekretario @sat-amikaro.org)

**Pri La Sago:** la franclingva suplemento malaperis el la kutimaj numeroj (kion pluraj bedaŭras), k estos anstataŭita de 8-paĝa tutkolora aparta jar-suplemento, preparita kun varba celo el la plej taŭga materialo arigita dum la jaro. Se proponiĝas redaktanto aŭ engaĝiganto por ĉiumonata FrSup, ĝi povos reapari pli regule.

**Pri kulturcentroj:** Greziljono aktive klopodas fari necesajn renovigojn (ĉ unu miliono da eŭroj entute!). Situacio eltenebla dum 4/5 jaroj, sed ĝis tiam necesas venigi mutle pli k pli ofte staĝantojn. En Kvinpetalo iom simila problemo en malsama strukturo. Deziro esprimita ke ambaŭ komitatoj laboru manenmane, ne dorsaldorse. Plu duboj de iuj membroj pri indeco klopodi savi ambaŭ strukturojn samtempe.

**Pri la filmo:** la antaŭmenda periodo estas plilongigita ĝis dum la somero. La filmo, sukcese projekciita jam plurloke post Seto, nun estas finita, la Eo-lingva versio (kiu servos kiel pont-lingvo por produkto de alilingvaj versioj) farata k premiera projekciado de la finita verko en Eo okazos ferme de la unua E-Kinofestivalo en Sao-Paŭlo en

## Enhavo

<b>SAT-Amikaro</b> Raporteto pri kongresaj laborkunsidoj	3/4
<b>Analizoj/opinioj</b> Pri komunikado, instruado, lernado La plej granda ekocido Financo kaj politiko	4 5 12/13
<b>Lingvo</b> Legindaj legendoj Kiel traduki : Coup	6 7/8
<b>Libro-servo</b>	8
<b>Recenzoj</b> Libro vivas pli longe ol unu sezono KD: Manŭel duonvoĉe...tutkore	9 13
<b>El nia leterkesto</b> Ni indignu ! KER Esperanta mapo de franclingvio	1,6 10 10/11
<b>Kontribuo al Vikipedio Aosta Valo</b>	11
<b>Diversaĵoj</b> E-e kuiru.	14/15
<b>Humuraĵoj-distraĵoj</b> Selle-humuraĵoj BD: Ĉe la lago	5,14 16
<b>Kursoj/staĝoj</b> Pluezeko	14
<b>Plu moviĝas la Movado - Le Mouvement en mouvement</b> L'espéranto au bac Esperanto, filmo de D. Gaŭtiero Parizo, Fontano Retaj animaciaj filmoj	2 2 14/15 16

julio. La fina DVD devus esti preta en septembro.

Agadraporto aprobata per 42 poroj.

**Financoj:** raporto aprobata per 2 sindetenoj k 36 poroj.



LA SAGO. CPPAP n° 0312 G 86224.

ISSN: 1763-1319.

Directeur de la Publication : Guy Cavalier.

Impr. TROISA, 91480 Quincy-sous-Sénart.

Dépot légal à parution.

**Ĉefredaktanto:** Vito Markovo. **Enpaĝiganto:** Serĝo Sir'. **Redakt- kaj korekt-skipo:** Andreo Andrio, Ĵak LePuil, Vito Markovo, Serĝo Sir', **kun helpo de:** Francua' Dekurcelo, Janine kaj Yannick Dumoulin, Véronique Girard, Phil Guichet, Jorgos, Lino Markovo.

**Partoprenis en ĉi numero:** Andreo Andrio, Fil, Laŭrenzo, Mirejo Grosjean, Aleks Kadar, Klod, Vito Markovo, Vjeko Markovo, Ĵak Le Puil, Marcelo Redulez, Louise Rigault, Bert Schumann, Jean Selle, Serĝo Sir', Pierre «Ŝtonĉjo» Soubourou, Juliette Ternant.

## Kontribuaĵoj Contributions

Ĉiam bonvenaj ! Sendu ilin al la redakta korespondanto:

Toujours bienvenues ! A faire parvenir au correspondant de rédaction:

**Serge Sire** (Serĝo Sir')

85 impasse des Fées 74330 Sillingy

Reto : [lasago@free.fr](mailto:lasago@free.fr)

■ Prefere per reto, **tekstoj** en RTF- aŭ TXT-formo por ligitaj dosieroj, skribitaj prefere en Unikodo, **bildoj** en TIFF-, JPEG- aŭ GIF-formo.

■ Eventuale sur papero, tekstoj **prefere** tajpitaj, sen forstreko nek surkorekto (erarojn eventualajn, oni indiku margene) Ne tajpitaj kontribuaĵoj publikeblas nur se volontulas iu tajpanto.

■ Artikoloj ricevitaj post la 20a de iu monato ne povas esperi aperigon en la numero de la sekvonta monato.

■ **de préférence par internet, textes en format RTF ou TXT pour un document joint, et images en format TIFF, JPEG ou GIF.**

■ éventuellement sur papier par poste, les textes devant impérativement être typographiés (machine ou imprimante) sans ratures ni surcharges pour un traitement au scanner (erreurs éventuelles notées en marge) Les articles manuscrits ne peuvent être publiés que si nous disposons de dactylos bénévoles.

■ Les articles reçus après le 20 du mois ne peuvent pas espérer être publiés dans le numéro du mois suivant.

**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.**

**Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto**

# La unuaj animaciaj filmoj en Esperanto



Simmon Keith  
Barney

<http://vimeo.com/19185725>

Jen frandindaĵoj,  
kiuj ĵus aperis sur la  
reto. Kiam longdaŭra  
samaĵo sur granda  
ekrano ?

## Ĉapejoj


Ranino kaj muso piknikas (1).  
La muso elmontras ĉapejon,  
per kiu (2), magie, sako (3)  
iĝis ŝako (4), kaj por fini la  
muso iĝis muŝo (5)...

Intertempe ankaŭ la nutraĵoj  
- la pico de la ranino (6) kaj la  
kaĉo de la muso (7) - spertis  
maldecetajn aliformiĝojn...

Kvankam senparola, ja tute  
pura esperantaĵo !

## Neĝuloj

Multe pli elementa, tamen frandinda. Tiuj neĝuloj  
tute hazarde iom similas la ĵus naskitajn Tribulojn  
de la lagulineto...



S.

